



# TEA-BULTENO

1ª JARO | NOVEMBRO 1998 | NUMERO 9



## AGENDO



**1 D**

2 L Konversacia Rondo - 17.30 h.

3 M Ordigo de TEA-arkivo

4 M

5 Ĵ

6 V Kato-Rondanoj kunvenas (*Edvige/Norina)*

7 S

**8 D**

9 L Konversacia Rondo - 17.30 h.

10 M Ordigo de TEA-arkivo

11 M

12 Ĵ

13 V Ekskurso tra vortaro *(Elda)*

14 S

**15 D**

16 L Konversacia Rondo - 17.30 h.

17 M Ordigo de TEA-arkivo

18 M

19 Ĵ

20 V Prelego pri gnostiko *(Anna)*

21 S

**22 D**

23 L Konversacia Rondo - 17.30 h.

24 M Ordigo de TEA-arkivo

25 M

26 Ĵ

27 V Sen-tema babilado

28 S Malferma Tago ĉe UEA en Roterdamo

**29 D**

30 L Konversacia Rondo - 17.30 h.




## EL NIA MONDO

### Esperanto en la kosmo

La internacia spacesplora ŝipeto *Huygebs* survojadas direkte al Titano, la plej granda luno de la planedo Saturno: tie ĝi alvenos en novembro 2004. En ĝi troviĝas kompakta disko sur kiu estas gravuritaj multegaj, diverslingvaj, mesaĝoj de teranoj. Inter tiuj ankaŭ esperantaj salutvortoj de la triesta samideanaro. Kaj nun el iu artikolo aperinta en la brazila revuo *Veja* (septembre 1998), ni ekscias, ke:



«En 2001 la entrepreno *Aerospatiale* lanĉos spacveturilon, kiu restos 50mil jarojn ĉirkaŭ la tero. *Keo* estas ĝia nomo. Dum tiu eksterordinara ĉirkaŭplaneda navigado, ĝi portos ok kompakt-diskojn kun mesaĝoj de la homoj. Jam nun, en la hejmpaĝo <http://www.keo.org>, ĉiu ajn povas lasi siajn salutvortojn, en iu ajn lingvo».

Pluraj esperantistoj ekprofitis de tiu ebleco kaj kompreneble ankaŭ triestanoj ne preterlasos tian okazon: ĉu ni decidu kune, kio restu plurdekmiljare sur la disko? Ni atendas viajn sugestojn!

### Kion opinias gravaj elstaraj homoj pri nia lingvo?

Fiere ni kutimas listigi la nomojn de tiuj eminentuloj, ŝtatestroj, aŭ famaj verkistoj, aŭ Nobel-premiitoj k.s. kiuj iam publike montriĝis favoraj al nia lingvo, kaj ni gardas ĵaluze tiujn deklarojn por ilin pruve «deklami» en oportuna okazo aŭ per ili provi konvinki pri la taŭgeco de nia ilo. Sed estus bone ankaŭ ekkolekti la diraĵojn kontraŭstarajn aŭ prijuĝajn, direktitajn de iu ajn «aŭtoritatulo» al Esperanto aŭ al nia movado.

Kaj ni komencu per la eldiro de la franca ĉefministro Lionel Jospin, kiam en Hongkongo, okaze de lia pasintmonata vojaĝo en Ĉinio, tiel esprimis sian opinion antaŭ gestudentaro: «*Ni finfine bezonas lingvon por la universala interkomunikado kaj ĉar tio ne estos Esperanto, lingvaĵo kiun volis krei iuj surbaze de ĉiuj lingvoj, tio estos sendube la angla.*»

Poste li aldonis ke kiam la angla estos de ĉiuj uzata, ĝi «*perdos sian originan belecon dum la ĉina kaj la franca konservos sian purecon. Sed necesas ke tio ne estu pureco de laboratorio!*» Fine li konkludis: «*Vi bezonas duan, fremdan, lingvon post la angla. Mi konsilas al vi elekti la francan.*»

Ĉu indas komentoj? Sekve de tio tuja reago de la esperantistaro: kiel unuaj retmesaĝis al la TTT-paĝoj de la ministro, Henri Masson kaj Claude Piron.

# Tie kaj tie pluketante...

Zorge de Elda Doerfler

## Jen kiel malantaŭen puŝi Esperanton!

Estas diraĵo kiu pli-malpli tekstas jene: *Bone aŭ malbone, gravas ke oni priparolu ĝin.* Ja, konsentite, sed ni tre atentu, ĉar tio ne ĉiakaze validas.

Malbona kaj fuŝa propagando povas malkonstrui nian brik-post-brikan, longjaran, faritan laboron dum, se oni kapablas tre elegante, ironie kaj efike rebati al ĉefe antaŭjuĝaj artikoloj, i.a. kelkafoje klare montrantaj la supraĵan konon de la skribinto pri nia afero, povas eĉ esti, ke iu konstraŭstara reklamo, iniciatita de la misinformitoj pri nia lingvo, transformiĝu al favora varbebleco.

Esperanto jam 110-jariĝis. Multo ŝanĝiĝis en la disvastigmaniero de la movadanoj, sed la esencaĵoj restas daŭre la samaj. En LA ESPERANTISTO, la unua internacilingva gazeto publikigita en Nurnbergo, redaktita de Zamenhof ekde la jaro 1889, aperas, en la numero 3ª - marto 1891 - tre interesa artikolo, kiu ankoraŭ havas ian ligon kun la nuntempo. La titolo estis: PRI LA MANIEROJ DE VASTIGADO. En ĝi estas donitaj kelkaj konsiloj rilate al propagando de nia lingvo pere de gazetaro. La rekomendoj pri la reklamada sistemo egalas al tiuj kiujn ni ofte legas en niaj Esperantaj ĵurnaloj. Tiam ĉefrolis la jena atentigo: *Ne batalu kontraŭ Volapuko, ne ĝin komparu al Esperanto, tio povas renversiĝi malfavore al viaj disvastigaj klopodoj.*

Nuntempe oni ne plu atakas Volapukon, ĉar ĝi iĝis netimiga fantomo, sed ni trovis alian rivalon sur kiun elkraĉi... ĉu komplekso de malsupereco? En aŭgusto pasintjara ekaperis sur la monda scenejo tute nova, elpensita lingvo, nomita EUROPANTO. Pri ĝi unuafoje oni legis en la belga semajna gazeto *LE SOIR ILLUSTRÉ*, poste en svisa, germana kaj aliaj ĵurnaloj. La esperantistaro certe ne perdis la okazon reagi al tio, kio ŝajnis atenco al nia kara lingvo, malgraŭ la admonoj de Claude Piron ne ataki ĝin, ĉar tio tute ne valoras la penon, ĉar ne temas pri aŭtentika artefarita lingvo, sed pri ŝerc-maniero ludi per lingvoj. Plie (vd. LA ETA GAZETO, 10/97, pĝ. 16) li aldonis, ke EUROPANTO *faras al ni grandan servon*, nome helpas superi *tiun psikologian reziston ke elpensita lingvo de unu homo ne povas funkcii.*

Kaj jen ankaŭ la ĉiutaga ĵurnalo de Triesto IL PICCOLO (11.09.98) reproponas, en la kultura paĝo, artikolon kaj intervjuon kun Diego Marani, la aŭtoro de Europanto. EUROPANTO: SE VI NE KONAS ĜIN, VI INVENTU estas la titolo. Post klarigo de la kialoj de tiu elpensaĵo kaj de la maniero krei ĝin: *42% da angla lingvo, 38% da franca, 15% da miksaĵoj el aliaj eŭropaj lingvoj, 5% da fantazio*, oni prezentas ankaŭ la «paĉjon» de tiu kreitaĵo, pri kiu interalie, en januaro venontjara, Marani publikigos eĉ libron. Certe estas, kiel jam sciate, ke tiu inventita lingvo naskiĝis kiel ŝerca ludo, kiu absolute nek volas nek pretendas fariĝi vera, elstudinda, interkomprenilo. Mi legis la plurkolumnan artikolon scivoleme, kvankam preskaŭ ĉio estis al mi jam konata... danke al Esperanto! Sed je certa punkto, jen iu komento de la ĵurnalisto kaj la sekva klarigo de Marani kiuj ŝokis min. Jen la tradukita teksto:

*«...dum li ricevadas entuziasmajn mesaĝojn... en Europanto, male estas personoj kiuj militon deklaris al Diego Marani: temas pri la esperantistoj...» «...al tiuj mi daŭre rediras ke temas pri nura ludado, pri nenio scienca, sed bedaŭrinde ili ne kapablas tion kompreni».*

Poste la intervjuanto petas, ke li klarigu la diferencon inter Esperanto kaj Europanto: *«Ho, plaĉas al mi diri ke la diferenco samas al tiu ekzistanta inter la elektronika muziko kaj ĵazo: la komponaĵoj de Schönberg aŭ Stockhausen estas ĉefverkoj pro racieco kaj rigora ekvilibro, ili ne posedas la komunikkapablon kaj spontaneecon de la ĵaza muziko, kiu ne havas regulojn kaj malrespektas ĉiun leĝon».*

Bonŝance ili revenis al la Europanta sukceso kaj tiel la legantoj ne havis eblecon pliriĉiĝi siajn jam prijuĝajn sciojn pri nia lingvo kaj precipe movado. Mi hontis dum tiuj legad-momentoj, ĉar el la vortoj kaj de la intervjuanto kaj de la intervjuato evidentiĝis nur ke esperantistoj estas obtuzaj, mallarĝmensaj personoj, kiuj vidas danĝeran atencon kontraŭ la internacia lingvo eĉ en ŝerca lingvaĵo. Europanto potenciale povus (aŭ tute ne?) havi estonton, eĉ ĝi povus iĝi tutmonda interkomprenilo, sed neniakaze konkurenci al Esperanto, se vere oni ĝisfunde kredas en la valoroj kaj ecoj de nia lingvo. Ni ne kondutu infanece ĉefe en rilatoj kun ĵurnalistaro aŭ konataj personoj: plej indas silenti ol laŭte protestaĉi kontraŭ ne ekzistanta birdotimigilo. Ni ne faru mispaŝojn per fuŝa propagandmaniero, ĉar tiel farante ni eĉ povas detrui ĉion ĝis nun atingitan sekve de multjara klopodado. Nia fasado al la ekstera publiko devas ĉiam prezentiĝi senmakula kaj kredinda, kaj tute ne ridindiga.

Do, ĉi-kaze, ni sekvu la konsilojn de Piron: *Ni ne ataku EUROPANTO-n, sed priparolu ĝin kiel pruvon pri la graveco de la problemo kaj nekonscian intuicion pri la vojo sekvinda.*

# Kampanjo 2000

## SEMINARIO EN NAPOLO
## 5 - 7 DECEMBRO 1998

### *Temo* - Altigu vian lingvan nivelon: Literaturo en Esperanto

Organizas ĝin ITALA ESPERANTO-FEDERACIO kunlabore kun la NAPOLA ESPERANTO-GRUPO. Elstare kontribuos al la programo la jenaj prelegantoj: Renato Corsetti, Amerigo Iannacone, Anna Löwenstein, Nicolino Rossi, Giorgio Silfer kaj Romolo Trivella.

Profitu de ĉi tiu grava okazaĵo por vi mem alstrebi, per via ĉeesto kaj aktiva partopreno, al plenumo de unu el la celoj de Kampanjo 2000.

Pluajn informojn donas TEA-sekretario.

**La 28an de novembro: Malferma Tago en Rotterdam ĉe UEA**

Prelegoj de C. Piron, muzikaĵoj de Akordo, rabatitaj libroj: jen kelkaj el la pluraj ĝuendaĵoj ofertotaj de nia CO!


BULTENO de la membroj de
TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
**Sidejo**: Via Crispi 43 - 34125 Trieste
tel/fakso: +39 040 763128; reto: nored@iol.it
**Poŝta adreso**: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro
Poŝtĉekkonto N° 10834349